

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Bertha von Suttner, la unua ina Nobelpremiito pri paco

**Prelegos:** Petr Chrdle

Bertha von Suttner (1843–1914), naskiĝis en Prago (tiam Aŭstria Imperio) kiel grafino Bertha Sophia Felicita Kinsky. Tridekjara ŝi edziniĝis kun Arthur von Suttner. En la jaro 1905 ŝi kiel la unua virino ricevis la Nobel-premion pri paco. Tutmonde ŝin famigis ŝia majstroverko [For la batalilojn!](#) Lian vivon kaj aktivadojn, inkluzive de tiuj literaturaj, priskribis P. Chrdle en la verko [Sen laco por paco: Vivo kaj verko de Bertha von Suttner](#).

Apud la porpacaj aktivadoj ŝi engaĝiĝis kontraŭ la tiam forta antisemitismo kaj okupiĝis ankaŭ pri virina emancipiĝo.

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 1-an de Junio 2021 je la 18-a h.

**Kie:** La renkontiĝo okazos rete per programo Skype (Skajpo).

Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retpoŝto marde.

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.

**La prelego estos registrata.**



## Ni rekomendas

**Lasta ebleco por universitata formado de instruistoj en AMU!**

La Adam Mickiewicz Universitato (AMU) en Poznano, unu el la plej signifaj polaj universitatoj, ofertas tri-jaran eksteran postdiplomatan studadon pri interlingvistiko kaj esperantologio, kun specialigxo en la tria jaro i.a. pri instruado de Esperanto. [La instruista specialigxo realigxas kun la kunlaboro de Edukado.net k ILEI](#). La studado okazos plejparte virtuale.

Partoprenontoj el la tuta mondo povas aliĝi ĝis la 1-a de aŭgusto. Pli frua aligxo bonvena.

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=849>

Polaj esperantistoj organizas la 20-an de Junio 2021 [Internacian Montaran Renkonton sur Granda Ĉantorio](#).

Vizitu [Arbaristan Panteonon](#) apud Brno. Bona loko por promenoj kaj biciklado.



## Cetera programo en Junio 2021

La 8-an **Romaoj** – Oldřich Arnošt Fischer

La 15-an **Koreio kaj Japanio - la landoj similaj sed diferencaj** – Petr Chrdle

La 22-an **Vizito de bestoĝardeno en Brno**



## 120-a datreveno de fondo de nia klubo

Esperantista klubo Brno kiel “První spolek esperantistů rakouských” (La unua asocio de esperantistoj aŭstraj) estis fondita en la jaro 1901. Ni festos nian jubileon la **18-an de Septembro 2021 en Brno**. Ni kore invitas vin. La programo ankoraŭ ne estas agordita.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo ([https://eventaservo.org/o/EO\\_Brno](https://eventaservo.org/o/EO_Brno))

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA>).

Milan Kolka  
prezidanto